


NIA VIVO

ESPERANTA SOCIETO "FRATECO"



San Vicente de Paul, 1.º
ZARAGOZA (España)

LA FONDINTOJ DE "FRATECO"



Agustin Montagud - Rafael Benítez - Emilio Gastón

La socia verko, kreita de ilia fervora iniciatemo, estas nun, en la brila momento de sia ora jubileo --kvindek jaroj da senhalta laborado!-- plej glora monumento al ilia memoro

JUBILEA NUMERO 1908 - 1958



ZARAGOZO

Jen urbo, kie la vortoj malmulte valoras, se ili ne reprezentas la veron de plej efektiva senco. Tial, en la frata saluto, kiun disflugigas nun la zaragoza esperantistaro al siaj karaj amikoj tutmondaj, regas plena sincereco en tekstoj aŭ frazoj, kies paroloj --se ne tiel belaj, kiel la evento meritas-- almenaŭ en la intenco estas ege spirite valoraj kvazaŭ mem sonoriloj el oro de la Ora Jubileo

De nia societo, la kvindeka jaro
de ĝia naskiĝo estas atingita;
de ĝia naskiĝo, malproksima en tempo,
sed de nia koro tiam tre proksima.

Kaj kiam la horo feliĉa sonoris
mi kredas aŭskulti voĉojn estingitajn;
la voĉojn de tiuj TRI sur kies ŝultroj
frateca societo estis konstruita.

Kaj la voĉo estis voko kaj riproĉo
por tia nuntempa malfervoro mia,
kaj revivigado de l'rememoro
kiu el mia menso forestis neniam.

Jen mi, do; mi venas al la nia hejmo
por fari kun ĉiuj rondon familian,
sub la stelo, verda kiel nia Espero,
en la Sankta Amo ĉiuj kunigitaj.

Tre karaj gefratecinoj!

Malproksimaj en la tempo estas jam la tagoj, kiam la brava triopo: Montagud, Benítez kaj Gastón, fondis nian amatan societon. Ili sentis en sia koro, tre profunde, la alvokon de Esperanto kaj dediĉis siajn fortojn al ĝia disvastigado en nia kara urbo.

Ili tuj komprenis la grandiozan mesaĝon de la Internacia Lingvo, kiu deziras kunigi la homojn en frata rondo, por ebenigi la vojon al hela estonteco por homaro pli feliĉa.

Ili sentis sin gajnitaj de la kara Majstro, Dro. Zamenhof, kiu estis glavo kaj flamo, en la servo de la afero al kiu li estis oferinta la tutan forton de sia personeco. Li, la okulkuracisto, kiu deziris sanigi la homaron de la blindeco de l'malamo kaj naciismo.

De tiam, kvindek longaj jaroj estas forpasintaj. La grupo de ili fondita senlace laboris kun obstina persisteco. Kelkfoje tre brile, aliffoje pli modeste, sed ĉiam kun firma entuziasmo. La rezulto estis sufiĉe kontentiga. Zaragozo ĉiam estis unu el la ĉefaj fundamentoj de la hispana esperantismo. Oni ne bezonos citi la nomojn de tiuj elstaraj figuroj, kiuj tiel digne tenis la flagon de FRATECO ĉiutempe, ĉar ili estas en la menso de ni ĉiuj.

Atinginte nian Oran Jubileon, dank'al la persista laboro de niaj antaŭuloj, ni devas montriĝi indaj je ili, perseverante en la apostola laboro.

Pro tio ni neniam devas forgesi, ke Esperanto estas fariĝinta tia matura lingvo, kia ĝi estas, ne nur dank'al liaj lingvistikaj ecoj, sed ankaŭ —tre speciale— dank'al la interna humana penso. Ni daŭrigu, do, nian fratan laboron kreante amikecojn ĉie, kie ni renkontas gesamideanojn.

Tiu estos la plej bela omaĝo al la memoro de la tri tondintoj: sekvi la vojon de ili montrita.

Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita, ĝi estas, la voj' elektita.

LA PREZIDANTO

Pedro Marqueta

Pedro Marqueta

Universaleco en la sentoj kompletigas universalecon en la lingvo!

Ĝojas mi, ke la Esperanto-grupo "Frateco" en la nuna jaro jubileas. Certe, 50-jara ekzistado de loka grupo estas speciala okazintaĵo en la historio de nia movado. Pro tio, mi elkore gratulas kaj dankas la lertajn kaj aktivajn gvidantojn de la Zaragoza grupo. Freŝa en mia memoro estas - kaj ĉiam tiel ĝi restos - mia tro mallonga restado en via bela urbo kun tiel afablaj geamikoj. La urbo estas, kiel la Virgulino de l' *Pilar*, freŝa, tre aloga kaj mirinde bela. Pro tio, la IKUE-kongreson en 1956 mi, tute certe, neniam forgesos. La Zaragoza "Frateco" estas unu el la plej viglaj Esperanto-grupoj, kiujn mi konas. Kompreneble, tiu celtrafa agado ne kreskas el nenio, sed ĝi estas frukto de daŭra laboro kaj penado de la estraro, precipe de S-ro Marqueta kaj de La Puente. Mi esperas, ke la proksima Zamenhof-jaro, la jubilea jaro de nia ĝenerala movado, certe trovos en Zaragozo multajn kunlaborantojn. Vi el-laboru Vian nunan jubilean feston, kiel elirpunkton por pli kaj pli fruktodona laboro estontece, por daŭra kresko de via jubilea grupo. Vivu "Frateco" kaj... "ad multos annos"!

Alfons BECKERS, pastro

Prezidanto de IKUE. Kwaadmechelen (Belgio)

Al la
Esperanta Societo "Frateco"
ZARAGOZA

Graz, 6-11-1958.

Kiam mi, en la jaro 1920^a, estis dissidenta la alvokon de Esperanto-Societo por Stirio al la Esperantistaro tutmonda, petante helpojn al la suferantaj stiriaj infanoj, viktimoj de la mondmilito, mi ricevis inter la unuaj respondoj leteron de S-ro Emilio Gastón Ugarte, el Zaragozo, kun konciza sciigo, kiu antaŭdestinis lin organizi en tuta Hispanujo la infanhelpan entreprenon kun plena sukceso:

"Karaj Samideanoj: La ĉi-tia Esperanta Societo "Frateco", kies fondinto mi estas, ricevis vian cirkuleron... kaj ni komencis labori por la sukceso de la ideo. Mi fide esperas tion..."

Inter la unuaj gastlokoj, kiujn Sr. Gaston sciigis al mi, estis la Esperanta Societo Frateco en Zaragozo, kiu restis la ununura Esperanto-grupo hispana, kiu en sia hejmo mem gastigis dum tuta jaro infanon el Graz!

Permesu al mi, tre estimataj gesinjoroj, uzi la okazon de via 50-jarifesto por refoje danki pro la de via societo praktikita samideaneco kaj por elkore esprimi al vi mian sinceran gratulon kun la deziro, ke "Frateco" ankaŭ estonte progresu, restante fidela al sia tradicio kaj al la ideoj de sia neforgeslebla fondinto.

Akceptu la respektajn salutojn de via sincera

SCHÜTZGASSE. 13
GRAZ. V. (AŬSTRIO)

Karl Bartel
Kunlaborinto de S-ro Gastón

... Kaj la spongo de la tempo ne forviŝis el la koroj tiun puran emocion, kiun, pro la ricevita helpo, spertis la tiamaĵ infanoj -- hodiaŭ plenkreskaj homoj -- ĝojantaj ankoraŭ nun deklari sian dankemon tiel ĉarme kaj spontane, kiel ĝi fluas en la sekvanta letero:

Karaj Esperanto-amikoj:

Okaze de la memortago pri la fondiĝo de la Esperanto klubo en Zaragozo, antaŭ 50 jaroj, estas korĝojo por mi rememori ankaŭ mian restadon en Hispanujo, kiel infano, antaŭ ĉio mian tiaman gasthejmon en via klubo kaj ĝian tiaman prezidanton kaj fondinton, la karan Sron advokaton Emilio Gaston. Ke mi en Hispanujo perdis mian koron, tiam infanecan, mi ne povas nei, malgraŭ la longa intertempo. Se nur io ajn okazas, kio revekas la memoron, tiam mi entuziasme partoprenas.

Tiel, ekzemple, mi gardas artikolon el Graza gazeto, en kiu estis priskribita la vojaĝo de USA-geedzoj el San Diego al kaj tra Eŭropo. Tiuj geedzoj trafis en Zaragozo tre fortan Esperanto-grupon, kies plej aĝaj membroj rakontis al ili pri infantransportoj en la jaroj post la unua mondmilito, organizitaj de la Grazaj Esperantistoj. La artikolo supozas, ke la infanhelpeza entrepreno por aŭstria infanoj restis eĉ post tiom longa tempo —pli ol 30 jarojn— ĉe la Zaragozaj Esperantistoj en tiel agrabla memoro, ke ili insiste rekomendis al la amerikaj gastoj, dum sia vojaĝo, nepre ankaŭ viziti Graz!

Tiu raporto sentigis min denove, kiel noble, bonvole kaj fidele ili kondukis pri ni, kaj kiel malegoistaj kaj kontentaj —malgraŭ nia infaneca stulteco kaj ebla nedankemo— ili estis kaj restis. Ĝstu malgranda satisfakcio aŭ eta rekompenco, se mi aldonas al la vortoj «Hispanujo-Esperantoklubo-Zaragoza» simple: «Paradizo».

Mi havis la feliĉon, mem esti gastinfano de la klubo; tre ofte mi havis la okazon paroli kun la Zaragozaj samideanoj, precipe kun ĝia fondinto, Sro Emilio Gaston, familie nomita de ni, aŭstria infanoj, «Papá» (paĉjo), kiu estis nia ĉiam afabla zorganto kaj al kiu ni ŝuldas ĉiaman dankon.

Ĉar mi tiam ofte gastis en la familio Gaston, estis aparta ĝojo por mi, ĉi-jare renkontiĝi en Graz kun F-no Inés Gaston Burillo, al kiu mi refoje dankas pro la afablaj salutoj el Zaragozo kaj pro la belaj donacoj kunprenitaj de tie.

Frue mi ekkonis la sencon kaj valoron de Esperanto, kies lingvon ni antaŭ nia forveturo, laŭ deziro de la aŭtoritatuloj de Graz, lernis en specialaj kursoj kaj kiu al ni helpis, en la unuaj monatoj en Hispanujo, venki la lingvajn malfacilaĵojn. Ĉu Esperanto ne signifis jam tiam eĉ pli ol nur interkomprenilon inter popoloj?

Signifoplene la klubo portas la nomon «Fratego». Afablecon, helpemon, interkomprenon en fratega maniero, tion ideale montris al ni («aŭstria infanoj el 1921») Sro Gaston, kaj al tutmondo Dro Zamenhof. En tiu senco, mi, en nomo de ĉiuj infanoj, deziras al via ŝatata klubo: feliĉon kaj benon por plua prospero!

Ĉiujn klubanojn salutas korege via dankema

Luise LEHNER

Ne nur en poemoj, sed ankaŭ en agoj, floras la poezio de Esperanto!

En la eksterordinara numero de NIA VIVO, eldonita antaŭ dudek-kvin jaroj, por celebri la Arĝentan Jubileon de «Frateco», aperis la sekvanta artikolo de nia karmemora samideano S-ro Emilio Artigas, instruinto de instruantoj kaj ekzemplodona homo. kies vortojn -vualitajn de plej pura honesteco- omaĝe al lia memoro, tre plezure ni represas

ANTAŬEN!!

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
Pri l' tempoj estontaj pensante,
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
Ni semas kaj semas konstante.*

ZAMENHOF

Tia estis la devizo de la unuaj pioniroj, kiuj komencis la esperantan movadon en Zaragozo.

Ni devas iafoje halti, por rigardi la trakuritan vojon kaj utiligi la sperton akiritan dum la batalo kontraŭ la renkontitaj ĉiuspecaj baroj. Multe instruas nin la studado de la pasinta tempo, ĉar la historio estas la plej bona gvidilo en nia mallonga, kvankam tre emociplena vivo. De la plano, kie Esperanto estas nun lokita, ni devas turni nian atenton kaj kortuŝe memori la «trion» kiu tiel alte flirtigis la verdan standardon.

La nomoj *Agustín de Montagud*, *Rafael Benítez kaj Emilio Gastón* tiel forte enradikiĝis en la cerboj kaj en la koroj de la malnovaj esperantistoj el Zaragozo, ke kiam ni memoras la jaron 1908^{an}, niaj fortoj multobliĝas ĝis ne imagebla grado, por sekvi la vojon montritan de la neniam forgesblaj gvidantoj.

Malfeliĉe Sro Benítez forlasis Zaragozo'n kaŭze de profesiaj devoj kaj Sro Montagud mortis. Anstataŭi ilin estis tute necble.

Restis la nelacigebla pioniro Sro Gastón kaj ĉirkaŭ li grupiĝis la ne multaj tiamaj esperantistoj. Ni ne silentos la gravan helpon de Sro Heliodoro Martín, kiu tre ĝentile metis sian lernejon (Colegio Politécnico) je la dispono de la esperantismo.

La lernantoj alfluis multenombren en la esperantaj kursojn, sed tio ne entuziasmigis nin, ĉar ni perfekte

komprenis, ke nur venis preterpasantoj, t. e. unutagaj floroj rapide velkontaj. Malmultaj tagoj sufiĉis por pravigi nin. Pasis la Esperanto-modo kaj el la multenombra lernantaro, restis kelkaj fideluloj, kiuj komprenis la veran rolon de la internacia lingvo.

La unua paŝo estis farita. En Zaragozo, Esperanto estis diskutata. Ĉu serioze? Ĉu moke? Ne gravas la diversaj manieroj interpreti la internacian lingvon. Por ni sufiĉis, ke moke aŭ serioze oni nomu multfoje Esperanton. En la jaro 1908^a la tiamaj esperantistoj (mi revenas denove en la unuajn momentojn) kies apogkoloroj estis la tri ĵus nomitaj pioniroj, kuraĝis fondi la societon «Frateco» nomo, kiu montras la sentojn plenigantajn la korojn de la tri fondintoj. La ĝojo havi jam societan personecon tiel fortikigis nin, ke la batalo kontraŭ la mokantoj kaj indiferentuloj estis akceptata. Diversaj faktoj silentigis la ridon de la sin nomantaj fortaj spiritoj, kiuj konsideris grava afero nur tion, kio tuŝas la korpajn sentorganojn aŭ liveras ian profiton.

Malrapide iris la Esperanto-movado, sed estis forta la fundamento sur kiu ni apogis nin por daŭrigi la propagandon. La mondmilito, kiu, nuligis tiom da pozitivaj valoroj, malhelpis ankaŭ la disvastigon de Esperanto, ĉar la spiritoj turnis nur la atenton al tiu neniam konata okazintaĵo.

Kiam paco fariĝis, kaj la homoj rigardis la freneze pasintajn jarojn, asocioj kaj organizoj fondiĝis por prediki fratigon ĉe la homoj. Esperanto revenis en sian decan postenon kaj ricevis fortan puŝon antaŭen. Ne nur oni faris la poresperantan propagandon, ankaŭ la peresperanta estis



Don-Kihoto kaj Sanĉo

energie komencita de tutmondaj organizoj, ĉu sciencaj, ĉu laboristaj, ĉu religiaj, montrante la vivantecon de la lingvo. Rilate al Zaragozo, mi povas konstati, ke Esperanto ankaŭ progresis, sed en la jaro 1925^a ni perdis nian karan Emilio Gastón, kies anstataŭanto estas ne trovebla. Tiu terura bato senkuraĝigis momente la zaragozan esperantistaron, sed baldaŭ ĉiu okupis sian postenon, por ne malsukcesigi la multajn penojn de la malaperinta samideano.

Per kunigo de P' fortoj de ĉiuj esperantistoj, por daŭrigi la komen-citan laboron kaj memorante la klo-podojn de nia pioniro, Esperanto antaŭeniris kaj «Frateco» fiere subte-nis la verdan standardon, ĉie respek-tatan. Post ĉi tiu rapida rigardo malantaŭen, ni devas pensi pri la estonteco. Sur la jam streĉitaj mal-novaj esperantistoj, la entuziasmo-plenaj junuloj devas fundamenti la fortikajon kaj el ĝi, eniri en ĉiujn organizojn, sciencajn, sociajn, ktp. por forigi la lingvan baron, kiu, kune kun aliaj antaŭjuĝoj, malhelpas la liberigon de la homaro.

La malfacilaj tempoj por Esperanto pasis, sed oni ne devas ripozi, ĉar longa estas ankoraŭ la trairota vojo.

† EMILIO ARTIGAS

MIA OMAĜO AL "FRATECO"

Kvankam neniam mi rilatigis senpere kun la Grupo "Frateco", mi tenadis ja longdaŭrajn kaj intensajn rilatojn kun ĝia karmemora fondinto kaj indoga prezidanto, de ĉiuj bedaŭrata, S-ro Emilio Gastón.

Nia kunrilato ek-taris, okaze de la gast-igado de aŭstriaĵ infanoj en nia patrujo, kelkajn jarojn post la unua mondmilito. Kiam la honorinda aŭstria samideano Karl Bartel faris alvokon, por helpo al siaj etaj sampatrujanoj el Graz, tuj respondis la grandanima Gastón, al kiu aliĝis kelkaj izolaj esperantistoj el niaj regionoj, celante la bonfaran entreprenon.

En la kataluna regiono, propravole sin oferprezentis S-ro Alavedra el Tarrasa, la geedzoj Comella el Vich, S-ro Serrat el Barcelono, kune kun la valenciano S-ro Mañez el Chestre, kaj ankaŭ mi, la sub-skribanta pastro el Gerona, kiuj kunagadis kiel aktivaj membroj de la Patronato star-igita en Zaragozo, sub la etikega estreco de S-ro Gastón. Ĉiuj el ni siaflanke serc-adis, laŭ sia kapablo, kiel eble plej grandan nombron da gastamaj familioj, pretaj ak-cepti en hejmeco 10-14-jaran knabon aŭ knabinon, kiujn S-ro Bartel, en taŭga ordigo, alsendus el Graz, sub la kondiĉo, ke ili estu sufiĉe instruitaj pri Esperanto, por ke ili povu interkompreniĝi.

Helpe de la ĝeronaĵ esperantistoj kaj kunlabore de la Ruĝa Kruco, estis eble enskribi kaj gastigi, en la teritorio de mia eparĥio, naŭdek-tri geintanojn, kies nom-registron karese mi konservas, kiel la solan dokumenton, kiun mi povis rehavi, post la detruiga batado de nia civila milito. Tion mi gvaras, kiel la plej valoran trofeon de miaj poresperantaj laboroj, ĉar vere la gastiga entrepreno estis realigata tiel plensukcese, kiel ni povis deziri, supervenkante la multoblajn barojn, kiuj kontraŭstaris. La idealismo de nia Movado montris tiel, ekster ĉia dubo, sian praktikan flankon.

Jen mallonga historia skizo, kiun oma-ĝe mi dediĉas al la Grupo "Frateco" en la 50-jara rememoraĵo de ĝia fondiĝo; precipe, kiel postmortan esprimon de respekto al ĝia ŝatindega fondiĝo, la tre bedaŭrata Emilio Gastón, kies klopodoj, tiom mal-avaraj kaj vere imitindaj, sendube multe valoris al li antaŭ la Supera Juĝanto.

Pastro JOZEFO CASANOVAS (Gerona)

REMEMOROJ

Preskaŭ hieraŭ, en la numero de la neforgesebla fratecana revueto NIA VIVO de julio de 1933^a, rememoriganta la xxv-an datrevenon de la fondiĝo de nia esperanta societo "Frateco", mi rakontis la gravan malsanan suferitan de "Frateco", kaŭze de la unua granda milito; kaj mi finis la tiaman verketon, atentigante pri kiel el la preskaŭ mortanta estaĵo eliris la kreskvivanta "Frateco". Tiam, mi eĉ ne povis pensi, ke je rememoro de tiu ĉi 50^a datreveno de la naskiĝo de "Frateco" mi devis verki ankaŭ kvazaŭ historieton de nia esperanta klubo.

Mi opiniis, ke nuntempe mia korpo estus jam polviginta kaj ke mia spirito estus kun tiuj de la plejparto de la kunverkintoj de tiama numero de NIA VIVO: S-roj Inglada, Artigas, Turrión, Redondo, Piñó, Salas, Bruquetas kaj Soler Valls, poste malaperintaj al ĉi tiu mondo.

Mi ankaŭ ne pensis, ke ni denove travivus malfacilajn tempojn; unue pro nia civila milito kaj poste pro la dua granda milito, ankoraŭ pli katastrofa ol la unua (1914-18), pri kiu mi parolis en tiama NIA VIVO de la 25^a datreveno. Ni ankaŭ devis lasi nian societatan ejon kaj lui alian lokon pli modernan, kvankam pli koston.

Sed, malgraŭ ĉio, "Frateco" ne fermis eĉ dum unu sola tago siajn pordojn; verŝajne, ĝi estas la ununura hispana kaj eble eŭropa esperantista societo, kiu spite la malfacilaĵojn, daŭrigis sian entreprenon.

Nun la mienoj estas agrablaj; la mano; iras premi aliajn manojn, la gazetaro parolas laŭde pri Esperanto, la aŭtoritatuloj donas al ni helpon. En nia klubo sonas virinaj ridoj, kaj ni, la maljunuloj, lasis la postenojn al la junularo, kiu pravis siajn fortojn, okazigante kun evidenta brilo en Zaragozo la xv-an Hispanan Esperanto-Kongreson (julio 1954^a) kaj iom poste la xxvi-an Kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (julio 1956).

Ĉu tio estas klara resaniĝo? La maljuneco faras nin mallidemuloj... Tamen, nepre necesas, ke junaj mienoj ridadu por gajigi nian amatan "Fratecon", almenaŭ ĝis ili povos festi la 75-an datrevenon de ĝia naskiĝo. Amen!

Jozefo Orós Gimeno

Honora Prezidanto de "Frateco"

Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam -neniu dubos- ni povos kuraĝe diri, ke niu afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas nian lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve, la sola efektive vera montrilo, ĉu ni progresas aŭ ne, estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj.

El artikolo de D-ro Zamenhof en "La Esperantisto" (kolekto de la jaro 1892^a)

■ JUNA SUKO ■

Okaze de nia kvindekjara datreveno, ni, gejunuloj, malmulton povas diri antaŭ ĉi tiu solena festo. Tamen, ni esprimas almenaŭ profundan dankemon al la fondintoj kaj subtenantoj de "Frateco", nelacigeblaj batalantoj por interkompreno kaj unuiĝo. Ni ĉiuj komprenas kiel utila estas al nia estonteco ĉi tiu idealo kaj kion da boneco ĝi enhavas.

Popola unuiĝo, jen baldaŭna bezono al kiu la juneco sopiras ĉi-momente; tio estas devo, kiun junuloj ne povas flankenlasi. Ekonomia, kultura, eĉ persona kuniĝo estas fakto tiel grava nuntempe, ke ne pripensi tion estas preterlasi la plej urgajn problemojn en la nunaj tagoj.

Esperantistoj, kunportantoj de idealo, kiu enhavas profundan sencon, noblan altruismon, bonecon, progreseman vildpunkton kaj senliman amon al "Frateco", estas devigataj bruligi, pere de ĉi tiuj spiritaĵoj, la skeptikan aŭ indiferentan amason. Ni devas oferi, kaj ni oferas, ĝojojn, optimismojn, ĉion indan por longe daŭrigi nian societatan vivon, kiun antaŭ duonjarcento fondis niaj antaŭuloj, pensante en nia hodiaŭna postvivado.

Dum la rememoriga bankedo, oni diris al ni: "Laboru, laboru kaj ne ĉesu!". Estis peto, kvazaŭ ordono, kiu ne falas sur senkulturan teron; kontraŭe, ni volas esti fruktodonaj semoj kaj labori ĝis la elĉerpo de niaj nuntempe freŝaj kaj junaj fortoj, ĉar ni estas certaj, ke esperantisto plenumas sian rolon, laborante ĝis la fino, kvankam li ne atingos la sopiratan celon. Ne elirante de la hela vojo; pere de la obstino, la espero kaj la pacienco, ni realigos la revitan triumfon de nia tre kara Majstro.

VICENTE PONS

Bankedo kaj Bela Festo en Restoracio de la Specimena Foiro, okaze de la ORA JUBILEO DE "FRATECO"

La esperantista societo **Frateco**, en Zaragozo, festas sian 50-jaran jubileon! Estis en la jaro 1908, kiam la meritoplenaj sinjoroj: Rafael Benitez, Agustin Montagud kaj Emilio Gastón fondis grupon, kun la celo kunigi ĉiujn esperantistojn de la urbo kaj intercesi ilin en la komuna tasko propagandi la noblajn idealojn de frateco kaj reciproka interkompreniĝo, karakterizaj de la esperantista ideo.

Dank'al la persista laboro de **Frateco**, sub la majstra gvidado de S-ro Emilio Gastón estis eble organizi la gastigadon de aŭstriaĵ infanoj, post la unua mondmilito. Pere de Esperanto, oni povis realigi tiun humanecan entreprenon, kiu siatempe havis grandan ehon en la internaciaj rondoj. La malfeliĉaj infanoj povis trovi hejmeccan patrujon sub la varma suno de Hispanio, gastigitaj de privataj familioj, dum du jaroj proksimume.

Senlace laborante por feliĝi la realigon de unu pli bona mondo, ebliganta la reciprokan interkompreniĝon, la veterana societo **Frateco** estas trakturinta longegan vojon, plena de sukcesaj realaĵoj. Ni rememoru nur la plej proksimajn lastatempe:

La organizo de la Hispana Kongreso de Esperanto, en la jaro 1954, kaj pli poste jam la Internacian Katolikan Kongreson de Esperantistoj, somere de la jaro 1956, kiu estis prezidita de la zaragoza Ĉefepiskopo kaj kiu havis grandegan sukceson.

En la nokto de la 25^a de Oktobro, la zaragozaj Esperantistoj kunvenis en la Restoracio de la Specimena Foiro, en solena vespermanĝo, por festi la Oran Jubileon de la ekzisto de sia amata societo **Frateco**. Partoprenis ankaŭ la feston svisa delegacio de la urbo Zürich, kun sia prezidanto S-ro Walter Sonderegger, S-ro Adolf Grüter, kun edzinoj Maria kaj Crecencia. Ili portis la salutojn de la svisaj gesamideanoj, kiujn oni aŭskultis per magnetofona bendo. S-ro Sonderegger montris sian ĝojon, povante persone gratuli la entuziasmajn zaragozajn esperantistojn, okaze de ilia grava kaj memorinda festo.

Prezidis la tablon la honora prezidanto de **Frateco**, S-ro José Orós Gimeno, kiu havis apud si S-ron Miguel Sancho

Izquierdo, eksrektoro de la zaragoza Universitato kaj S-ro Pedro Marqueta Roy, nuna prezidanto de **Frateco**. En la sama prezida tablo honorinde sidis S-ro Walter Sonderegger, fraŭlinoj Emilia kaj Inés Gastón, filinoj de la fondinto, kaj S-ro Fernando de la Puente, prezidanto de la Katolika Esperantista Hispana Asocio.

Dum la vespermanĝo, oni aŭskultis koncerton pri svisa popolmuziko, kio estis donaco de la eksterlandaj gastoj, per magnetofona bendo. Oni reciprokis, aŭdigante diversajn pecojn pri la hispana popolmuziko, meze de la ĝenerala entuziasmo.

Oni legis la salutojn ricevitajn: La unua, de la ĝenerala Sekretario de Universala Esperanto Asocio, Profesoro Dro. Ivo Lapenna, la ŝatata nelacigebla batalanto de nia sankta afero. Jen liaj vortoj:

•**KARAJ GEAMIKOJ:** En la historio de la Esperanto-Movado, la lokaj societoj estis kaj plue estas tiuj bazaj stonoj, sur kiuj estas fondita kaj plue konstruiĝas la granda palaco de la Esperantismo. De ilia bona laboro dependas en la lasta linio la diskonigo de Esperanto per taŭga informado, la instruado kaj daŭra praktikado de la lingvo, la fortikigo de humanecaj sentoj, la kreado de nova tuthoma kulturo per tuthoma lingvo. En la nuna stadio, la societioj estas fakte la ĉefaj lokoj, kie la Internacia Lingvo daŭre vivas kaj evoluas.

Societo, kiu sukcesis dum plenaj kvin jardekoj efike plenumi tiujn esencajn taskojn por la progresado de Esperanto, okupas vere elstaran pozicion en la Esperanto-Movado kaj meritas la estimon de ĉiuj, kiuj komprenas la eksterordinaran gravecon de la Internacia lingvo por kulturo vere monda kaj por homaro pli feliĉa.

Tial, mi petas vin akcepti, okaze de la 50-jara jubileo de via societo, la plej korajn gratulojn kaj bondezirojn en la nomo de U. K. A. kaj en mia persona.

Kun multaj salutoj kaj amikaj sentoj,
sincere via

Dro. IVO LAPENNA

Sekvis la saluto de D-ro Rafael Herrero, el Valencio, aktiva Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kiu estis tiel:

Karaj gefratecanoj!

Okaze de la unua duonjarcenta Jubileo de **Frateco**, neniu el vi povas dubi pri la korszincero de miaj sentoj, kiuj estas, tute certe, la samaj en la koroj de ĉiuj membroj de H. E. F., nia nacia organizo.

Ĉiuj hispanaj esperantistoj agnoskas la gravecon kaj la elstarecon de la Fratecana Societo, kiu tiel aristokrate svingas la flagon de nia lingva idealo, kaj tiel demokrate disdonas la benon de la internacia lingvo en la aragona regiono.

Mi bedaŭras tre sincere, ke profesiaj devoj - kaj ĉiam profesiaj devoj de kuracisto estas premaj - tute malebligas min festi kun vi tiun feliĉan datrevenon. Tio estus por mi tiel ĝojiga, kiel por vi men, ĉar ĝi estus doninta al mi la gravan plezuron trovi min dum kelkaj horoj inter vi, bonaj amikoj, bonkoruloj, kiuj penas, kiel ni ĉiuj, por donaci al la homaron plej bonan vivmedion, dank' al Esperanto!

Ĉiam, okaze de naciaj kongresoj, mi emfazas pri la plej ŝatinda aspekto de niaj kunvenoj. Tio estas la fakto men de nia kunestado, la renkontiĝo kun malnovaj samideanoj, la starigo de novaj amikaj sentoj kaj la vibrado, dum la tuta daŭro de la kongreso, de tiu vera familia rondo, kiun ni deziras por la tuta mondo, kaj kiun ni komencas starigi inter ni men.

Mi deziras omaĝi publike la nomojn de tiuj, kiuj, pionire, fondis **Frateco**-n kaj penis, dum la fruaj jaroj, por briligii nian Movadon; de tiuj, kiuj jam malaperis, kaj de tiuj, kiuj ankoraŭ postrestas, por montri al la junularo la bonan vojon kaj la decan manieron. Kaj mi deziras ankaŭ saluti, per miaj vortoj, tiujn, kiuj alvenis en la nuna

tempo por daŭrigi la taskon kaj kunhelpi ĝis la hela tago, kiam Esperanto atingos generalan akcepton en la tuta mondo.

Kaj mi esperas ja, ke, kiam **Frateco** festos sian centjaran jubileon, kelkaj el vi, la plej junaj, plaĉe memoros pri tiuj, kiuj hodiaŭ festas tiun datrevenon, por honori, kiel decas, idealon tiel laŭdindan, kiel Esperanto, kaj societon tiel respektindan, kiel **Frateco**.

Kore, do, salutas vin via amiko

Dro. RAFAEL HERRERO

De S-ro Luis Hernandez, el Valencio, Redaktoro de **BOLETIN**, oficiala organo de Hispana Esperanto-Federacio, oni ricevis la sekvantajn salutvortojn:

Atinginte sian Oran Jubileon, la Grupo "Frateco" de Zaragozo rajtas fieri, ke, nek en unu sola tago de sia duonjarcenta ekzisto, ĝi forgesis persisti en la noblaj idealoj de Esperanto. pruvante tiel -laŭ pure aragona stilo- eĉ meze de plej malfacilaj cirkonstancoj, ke, inter la espero kaj la pacenco, por kompletigi la triopon de la esperantistoj virtoj, plej elstare troviĝas la obstino.

Sekve, kiel en multaj aliaj okazoj, ankaŭ en defendo de la lingvo Internacia, Zaragozo, bela ĉefurbo de la brava Aragono, estis kaj estas kaj estos ĉiam granita pilastro por la hispana esperantismo.

Antaŭen, do, al kompleta jarcento!

LUIS HERNANDEZ



La fratecanoj gaje festas en bona harmonio'



Eksterlandaj san

Tuj sekve, oni aŭdis per magnetofona bendo, la salutojn de la gesamideanoj el la urbo Zürich, en Svislando, kiuj per simpatiaj vortoj gratulis la societon **Frateco**, okaze de ĝia Ora Jubileo. Tiel same de S-ro Zimmermann, iama fondinto de la grupo "Frateco" en Vieno, kaj prezidanto dum multaj jaroj; de S-ro Maksabeck, per kortuŝaj vortoj en bonega Esperanto; de hungara rifuĝinto, Stefano Moroeh, kun belaj frazoj kaj bondeziroj; de Werner Laederach, kun interesaj sciigoj pri laboro esperanta, en la kadro de popolaj universitatoj; de S-ro Emil Ammann, bonega amiko de **Frateco**, kiu vizitis nin lastatempe, kaj kiu per tre emociplenaj vortoj bedaŭris la maleblecon kunfesti la eventon, kiel estus lia granda deziro.

Tre karaj eksterlandaj gastoj! Tre karaj gefratecanoj!

Kun ĝojo ni kunvenas hodiaŭ por festi la Oran Jubileon de nia kara societo **Frateco**. Tio estas tute neordinara evento, kiu atestas pri la entuziasma kaj sindona laboro de niaj pioniroj, kiuj semis kaj semis sur fruktodona tero, kaj kies rikolton ni povas en la nuna tempo konstati. Esperanto estas jam grava afero; ĉie en la mondo oni scias pri la valoro de la Internacia Lingvo. Sed tio estis ebla nur dank' al la obstina laboro de tiuj, kiuj en la komencaj tempoj, estis apostoloj de nia idealo kaj kiuj, per sia entuziasmoplena laboro ebligis la masivan fundamenton sur kiu nun ni forte staras.

Tiujn ni deziras omaĝi nun. La nomoj de Agustín Montagud, Rafael Benítez kaj Emilio Gastón restos por eterne gravuritaĵoj en nia koro, kiel fondintoj de nia amata societo **Frateco**.

La du unuaj tro rapide malaperis. S-ro Benítez forlasis nian urbon kaj S-ro Montagud baldaŭ mortis. Sed restis la elstara figuro de S-ro Emilio Gastón, kiu alte tenis la flagon de la esperantismo kaj majstre kondukis la aferon antaŭen. Mirinda estis lia laboro, kiu kulminis en la organizo de la gastigado de aŭstriaĵ infanoj en Hispanujo. Sed en 1925 li ankaŭ mortis. Liaj gefiloj, tre entuziasmaj esperantistoj, daŭrigis ankaŭ lian laboron kaj ni estas feliĉaj, ke ili sidas hodiaŭ inter ni. Kun profunda emocio ni esprimas al ili nian dankemecon, honorigante la memoron de ilia patro.

Sekvis la vico de rimarkindaj homoj, kiuj siavice prenis la torĉon por certigi la daŭrigon de la vivo de **Frateco**. La nomojn de Maynar, Luna, Larruga, Senra, Pérez Vidal, Floria,

S-ro Walter Sonderegger, prezidanto de la Grupo Zürich, ankaŭ gratulis sincere, je nomo de la Svisa Fervoĵista Esperanto-Asocio. Elkore li dankis pro la invito ĉeesti la feston, konstatante, ke Esperanto vere vivas, kaj ke sangdevena frateco mulfoje ne estas tiel sincera, sindona kaj oferema, kiel ĉe esperantistoj. "Mi vojaĝis jam tra 34 diversaj landoj; kaj ĉie mi renkontis amindajn homojn, kun kiuj mi povis vere ĝui la internan ideon de Zamenhof. Mi finu kun jena proverbo: Amo kreas pacon, pacamo konservas homecon, homeco estas plej alta idealismo".

Brua aplaŭdo sufokis liajn finvortojn.

La prezidanto de **Frateco**, S-ro Pedro Marqueta Roy, prononcis jenajn vortojn, meze de solena atento:



estas bela ornamo



La prezida tablo kun la gvidantoj dum la bankedo

Bruquetas, Salas, Martínez kaj Mañez, neniam ni devos forgesi, kiam ni konsideros la historion de **Frateco**. Sed aparte staras du gigantaj figuroj. La unua estas la forpasinta S-ro Emilio Artigas, la nelacigebla profesoro de pluraj generacioj de esperantistoj. Modesta, entuziasmplena, ĉiam diligenta, tre granda animo en malgranda korpo, li estis modela homo kaj modela esperantisto. Li estas ankoraŭ vera ekzemplo por ni ĉiuj.

La dua, feliĉe, estas nun inter ni. Li estas nia kara honora prezidanto, S-ro José Orós, Gimeno, kiu prenis la prezidantecon de **Frateco** en vere malfacilaj momentoj kaj scipovis majstre gvidi nian societon dum longaj jaroj. Dum lia prezidanteco, nia societo atingis altan stadion, kiu kulminis en la neforgesebla Hispana Kongreso de Esperanto, en la somero de 1954. Mi petas al ĉiuj fratecanoj montri sian dankemon por varma aplaŭdo al li.

Mi finas mian malgrandan disertacion gratulante ĉiujn membrojn de **Frateco** pro la Ora Jubileo kaj instigante al ili persisti en sia nobla laboro, por disvastigi la idealon de la Internacia Lingvo per paco kaj amo. Ni neniam forgesu, kun nia kara majstro Zamenhof, ke:

Tondra aplaŭdado premiis la oratoron pro liaj solenigaj vortoj.

S-ro José Orós, honora prezidanto de **Frateco**, parolis nun por danki la vortojn prononcitajn, tute nemerititajn, laŭ lia opinio. Montris sian ĝojon pro la bela aranĝo de la nuna festo kaj certigis, ke, se S-ro Gastón estus nun ĉi tie, certe li sentus sin tre kontenta, vidante kiamaniere liaj posteuloj daŭrigas la laboron de li komen-citan. La filinoj de la fondinto, kiuj ĉeestis, kiel dirite, salutis per tre kortuŝaj vortoj, dezirante al ĉiuj ĝojon kaj feliĉon.

S-ro Miguel Sancho Izquierdo, eksrektor de la zaragoza Universitato, parolis kiel reprezentanto de la veteranoj, kunlaborintoj de tiuj tri personoj, kiujn ni hodiaŭ omaĝas, li rememoris pri la laboro en la komencaj tempoj.


S-ro Fernando de la Puente, en la nomo de la katolikaj esperantistoj, salutis la

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Ĝe guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.*

ĉeestantojn kun la deziro, ke ni ĉiuj, la samaj personoj, kunvenu post aliaj kvindek jaroj, por festi la Centjaran Jubileon de **Frateco**. Gajaj aplaŭdoj lin salutis.

S-ro José Larruga, ankaŭ kiel veterano de la unuaj tempoj, emocije prononcis salutvortojn. La familianoj de S-ro Gastón dankis ĉion, kion oni faris por honorigi la memoron de ilia patro kaj esprimis sian kontentecon pro la digna aranĝo.

Post la seriozaj vortoj, la muziko gaje sonis kaj la gejunuloj povis ĝui, dancante kaj babilante, ĝis malfrua horo. Inter la veteranoj estiĝis diversaj grupoj, komentariante la preteririntajn tempojn, kiam **Frateco** estis vere multe pli juna ol nun ĝi estas. La svisa delegacio montris sian admiron pro la belege sukcesinta festo kaj treege gratulis ĉiujn fratecanojn.



Zaragoza senhalte transformiĝas, pibeligante sin, kun rango de moderna kosmopolita urbo, ĉiam fidele gardata de la trankvila fluado de rivero Ebro

NIA SALUTO

Fratoj, manon donu kore
kaj senzorge, sendolore
Belan horon festu ni!

Zamenhof

“Frateco” festas sian Oran Jubileon!

Ni atingis gravegan mejloŝtonon en nia konstanta irado, tra la vojo de la esperantista laborado. Estas bone nun iom mediti kaj rememori pri la forpasinta tempo. Pri la estinta vivo de nia kara societo kaj pri la rilatoj, kiujn ni havis kun la cetera mondo esperantista; kun la gesamideanoj, kiuj, havante la saman celon kiel ni, dum sia esperantista aktiveco, kavis kontakton kun la membroj de “Frateco”.

Foje, pro tio ke ili vizitis nian urbon kaj travivis la amikan atmosferon de nia grupo. Alifoje, pro tio ke ili renkontis en siaj landoj la membrojn de “Frateco”, okaze de niaj eksterlandaj vojaĝoj, ĉu pro libertempoj aŭ pro aliaj privataj profesiaj celoj, En ĉi tiu horo, kiam ni festas gaje la eventon, nia penso ankaŭ iras al ili; kaj ni scias, kiel ĝoje ili kune sidus apud ni kaj tostus je la prospero kaj sukceso de la estonta vivo de “Frateco”. Mi deziras al ili sendi, de ĉi tie, nian varman saluton, plenan de simpatio. Al ĉiuj, kiuj skribis gratulante, kaj ankaŭ al la aliaj, kiuj eble ne scias, ke ni nun festas datrevenon.

Tiel, ni sendas plezure elkoran saluton al nia admirata Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu tiel bele gratulis al “Frateco” per siaj ĉiam trafaj vortoj. Mi bone memoras mian renkonton kun li, en Haarlem (Nederlando) dum la Universala Kongreso de Esperanto, kiam mi transdonis al li esp. standardeton, kiel donacon de “Frateco”.

Al S-ro Hans Jakob, en Genevo (Svislando), kiu gvidis nin ĉi-somere, kiam ni, kiel pilgrimantoj, iris tra la lokoj, kie U. E. A. travivis sian unuan periodon. Tio estis neforgesebla leciono pri la historio de Esperanto kaj ĝiaj pioniroj.

Al S-ro Ivan Krestanov, en Bulgario. Ni ne forgesis ankoraŭ la belan prelegon, kiu li faris en 1936, en nia urbo.

Al S-ro Karl Bartel, en Graz (Aŭstrio) organizinto de la vojaĝo de aŭstriaj infanoj al Hispanio, en kunlaboro kun “Frateco”, jam antaŭ 38 jaroj. Tiel same al D-ro Adolf Halbeld, lia kunlaboranto, kiu ni salutis persone ĉi-somere en Vieno, aminda persono kaj vera ekzemplo por esperantistoj.

Al S-ro Ismael Gomez Braga, en Rio Janeiro, (Brazilo), kiu akceptis en 1952

nian tiaman viceprezidanton en vere unika familia rondo, montrante la altan valoron de la interna ideo de Esperanto.

Al Pastro Alfons Beckers, el Belgujo, Prezidanto de I. K. U. B., kiu vizitis nin dum la Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, de 1956, kaj postlasis tre simpatian rememoron.

Al gesinjoroj Jandyra kaj Mario Rodriguez Monteiro, en São Paulo, (Brazilo), admirindaj esperantistoj, kiuj ebligis gravegan eksperimenton por la utileco de Esperanto, en la internaciaj industriaj kontaktoj, pri kio mi mem estis aktoro, dum nia vojaĝo al Brazilo.

Al F-ino M. H. Vermaas, en Rotterdam (Nederlando), kaj S-ino Emilja Lapenna en Zagreb, kiuj tiel vere amikece akceptis grupon de fratecanoj en Rotterdam.

Freŝa restas la vizito de la esperantista paro, gesinjoroj Helmuth, el S. Diego de California (Usono), kiuj tiel profunde gajnis nian simpation. Aktuala estos por ni ĉiam la fluanta ĉarmo de la familio Minnaja, el Romo (Italio) kiu tiel samidane akompanis nin kaj laboris por ke nia impresio pri la Eterna Urbo estu vere neforgesebla. Ni tostas ankaŭ je ilia sano!

Al fratinoj Dresden, la estonaj poetinoj, kiuj koresponde havis daŭran rilaton kun nia sekretario, S-ro José Martínez.

El Belgujo ni konservas la plej amikan rememoron. La oftaj vizitoj al nia Grupo de F-ino Iona Meurrens, el Loveno, starigis vere agrablajn rilatojn. Ŝia patrino Anna ankaŭ vizitis nin; kaj pluraj fratecanoj vizitis ilian hejmon en Loveno.

Neniam mi finus la citadon. Estu miaj lastaj vortoj, mia fina saluto, por admirinda paro: gesinjoroj Sonderegger, el Zürich, kiuj persone venis al Zaragozo, por kune festi kun ni la gravan datrevenon. Kiel reprezentantoj de ĉiuj eksterlandaj amikoj de “Frateco”, ili levis la glason kaj tostis kun ni. Inter la urboj Zürich kaj Zaragozo, (en ambaŭ koincidas la litero Z ĉe la komenco!) estiĝis vere fratu interrilato, en ideala atmosfero.

Karaj geamikoj, ĉie en la mondo, kun vi ni festas la ĝojon de solena evento:

La Ora Jubileo de “Frateco”!

PEDRO MARQUETA ROY

PERSEVERO...



*Tiu, kiu scias voli kun
persevero, atingas ĉion!*

Persevero estas kapablo per kiu ni povas fari ion, malvalorigante la obstaklojn kaj malfacilaĵojn, kiuj baras niajn projektojn. Kiam ni intencas fari ian decidon, unue ni devas mezuri la avantaĝojn kaj eblecojn de la agado. Neniam ni devas komenci gravan aferon sen lerta, detala kaj atenta pristudado. Sed, kiam ni konscias pri la utileco de la afero kaj firme decidis fari tion, ni devas sekvi la vojon komencitan ĝis la fino. La persistemaj personoj, kiam ili trovas obstaklojn al siaj entreprenoj, ne nur ne lasas tion, sed kontraŭe ili eĉ kuragiĝas pli kaj pli, samkiel la militisto, kiu ne forkuras antaŭ la malamiko. La aliaj haltas antaŭ la unua baro kaj parolas pri "malbona sorto", kiam la entreprenoj malsukcesas. Kaj, kiam ili aŭdas pri personoj, kiuj feliĉe finas siajn entreprenojn, ili diras: "Se estus mi, kiu pretendus tion, mi malsukcesos, sed al li ĉio iras bone". Efektive, ĉio iras bone al tiu, kiu persistas en siaj entreprenoj, al tiu, kiu scias subteni sian volon, spite la kontraŭbarojn. Nuntempe, la obstakloj, kiujn ni trovas ĉie, pligrandiĝas kaj plinombriĝas, la lukto por ekzistado fariĝas pli kaj pli streĉa, kaj, pro tio, nia volo devas esti pli kaj pli forta kaj obstina.

Se ni agadas sen malpacienca kaj gvidas ĉiujn niajn fortojn en la sama direkto, kun senĉesa aktiveco, ni povas esti certaj, ke ni sukcesos.

Antaŭ 50^a jaroj, tri fortaj viroj naskis "Fraterco"-n; kaj Fraterco kreskis kaj atingis sian maturecon. pro la persistemo de sia anaro. Dum la longa vivo de la Societo, ĝi trapasis multajn obstaklojn, sed feliĉe ĝia devizo estis: "Persevero" kaj tiu virto faris la miraklon, ke hodiaŭ ni povas festi ĝian oran jubileon. Ni ĉiuj, la nuna anaro de "Fraterco", estas respondecaj de ĝia vivo kaj de ĝia estonto. Ni estu, kiel estis niaj antaŭuloj, persistemaj, eĉ obstinaj en nia fervoro por Esperanto; tiamaniere, la vivo de "Fraterco" glitos milde kaj senhalte ĝis ĝia centjara jubileo.

Fernando De la Puente



Sr-ro Fernando de la Puente donacas skatolon kun frandaĵoj al knabino en aragona kostumo, kiu intervenis en folkloro festo, dum la 18^a Hispana Kongreso de Esperanto, en Madrido, somere de 1957

Blanka Fabelo

Al mia Zaragoza amiko J. Martínez

Frosto severa. Vespero malfrua.
Neĝo kraketas sub paŝo izolata.
Super la blanka ĝardeno senbrua
flagras ĉielo en brilo simbola.

Meze de l' blanka fabelo mistera
haltas nevole vi, preskaŭ senspire,
kaj sinforgese, kun miro sincera
longe staradas senmove. admire.

Arboj, arbustoj en pozoj meditaj
nun al graciaj estaĵoj similas,
la arbobranĉoj, per prujno tegitaj,
formojn pentrinde belegajn akiras.

Kvazaŭ de algoj kovrita marfundo
nun la ĝardeno fabela aspektas.
Brilas stelaroj en ora abundo...
Blankajn fabelojn la nokto ekplektas.

Ho, la fabeloj argentaj kaj ĉarmaj,
ĉien ŝutiĝas kun muta kareso,
blankaj neĝeroj kaj steloj malvarmaj
lulas la koron nun al Sinforgeseo.

Hilda DRESEN (Estonio)

Maria Under

(ESTONA POETINO)



Omaĝo en ŝia 75^a datreveno

Mia printempo

Printemp' al mi jam post Kristnasko venas:
je sunradioj longe kor' sopiris,
sekrete ili nun al mi eniris,
jam mia ĉambro morna ekserenas.

Ho, salutataj estu, ke tra neĝblovado
vi tiel frue min viziti povis,
ke vi rigardon mian lum-evitan trovis,
kaj ĝojrebrilon donis al griza strato!

Mi kortuŝiĝas, larmoj ekaperas:
ĝisvivi ĝojojn forajn mi esperas
kaj atendados ilin sen eklendo.

En viv' plej bela certe estas - la atendo,
mi tial nun jam revojn pri l' somer' dolorotos
kaj kun fervor' la vintron ekbojkotos.



Mi amas vian amon

Mi amas vian amon kaj sen fin'
admiras ĝin: ja save sen kompar'
efikis via amo, sen ŝpar'
esprimas dankon ardan la anim'.

Ne plu per plaŭdetad' fontana vin
mi lulos - sed inundos kvazaŭ mar'!
Arbuste mi plen-plenas je florar',
ekbenis la amsuno min sen lim'.

Mi amas vian amon! Via kor'
per am' la mian ami vin instigas,
min igas bela via am-fervor'.

Sopirsoifon mian vi mildigas:
avide viajn vortojn mi trinkemas,
por mi tenero via dolĉoplenas.

Feliĉon atendente

Ne surprizos la feliĉo, kiel revis tion kor':
ĝi rezultos penad' kaj multa dolor'.

Ne alkuras dancopaŝe ankoraŭ mi ĝin -
sed preĝante alpaŝadas kun pia kapklin'.

Ne prikantas mi himne ĝin kun laŭta jubil',
ĉar ankoraŭ tro larmas la kor' en humil' -
ho, feliĉo, mi plore genuas sur ter':
venu en la koron, kiun purigis sufer'!

Sed feliĉ' mia, kiel vin gardu anim',
ke vi ree ne fuĝu de mi pro ektim'?

Brilu kvazaŭ rubenokron' sur mia harar' -
ne disfalu papave petal' post petal'!

Aĥ, feliĉ' ununura! jen mia dezir':
ke samtempe restadu en kor' - la sopir'!



El estona lingvo tradukis

Hilda DRESEN

NIA ORA JUBILEO

Jen interesa kontribuajo de nia ŝatata samideano F. Mañez, meritoplena veterano, loĝanta nun en Zaragozo, kiu ankaŭ festas -koincide kun "Frateco"- la Oran Jubileon de sia fekunda esperantisteco. Koran gratulon!

Al mi oni proponis, ke mi verku ion por «Nia Vivo». Kvankam mi timas malbeligi tiun broŝuron, pro mia manko de verkista talento, mi tamen tre plezure obeas la dezirojn de la organizintoj, ĉar mi kredas, ke ĉiuj esperantistoj devas fari sian eblon discipline kaj lojale por plej baldaŭ akceli la triumfon de Esperanto.

En Cheste (Valencio), la jaron 1888^o mi naskiĝis, filo de meriĉaj terkulturistoj. En miaj unuaj jaroj, mia patro kripliĝis kaj mia patrino frenezigiĝis. Dekjarulo, mi devis jam forlasi la vilaĝan lernejon por ĉiutage labori en la kamparo, helpante tiel mian familion. La jaron 1908^o mia patro mortis; kaj, pro tin malfeliĉa kaŭzo, mi nepre devis estri la familion, inkluzive mian frenezan patrinon. En la sama jaro, mi komencis lerni Esperanton. Certe, nenion mi sciis tiam pri Esperanto, eĉ nek pri ĝia ekzisto, sed amiko mia rakontis al mi, ke li legis gazetan raporton pri tiu lingvo, ĝiaj avantaĝoj kaj ebloj. De tiam ekokupis mian koron la Interna Ideo, kaj mi komencis revii pri tutmonda lingvo, pri homara familia rondo kaj anu tuthoma. Kompreneble, tio estis nur knabaj revoj, sed ili profunde gravurigiĝis por ĉiam interne de mia koro.

En Valencio, mi aĉetis en librejo de amiko mia gramatikon de Esperanto kaj anglan gazeton de la internacia lingvo. Mi renkontis valenciajn esperantistojn, kun kiuj mi plezure interrilatis. Tiam mi ekkorespondis kun fremdaj gesamideanoj kaj, depost tiu tempo, mi jam konsideris min esperantisto. Decidinte instrui Esperanton en mia vilaĝo Cheste, mi portis miajn internaciajn korespondataĵojn al la ĉefa kafejo de la vilaĝo, por tiamaniere vekti la intereson de miaj samvilaĝanoj. Ilia scivolemo baldaŭ kreskis per la vidado de multaj leteroj kaj poŝtkartoj, venintaj el foraj landoj kaj adresitaj al mi, simpla kamparano. Al multaj min demandintaj pri tio, mi tre ĝoje klarigis la aferon kaj ili estis miaj unuaj lernantoj.

La afero vere sukcesis, la nombro da lernantoj ĉiam pli kaj pli kreskis kaj, rezulte de tio, nova Esperanto-klubo

naskiĝis. Sed en la jaro 1914^a eksplodis la tiel nomata eŭropa milito, kiu tiun mian laboron ruinigis. Ne strange, ĉar la milito ĉiam estas terura malamiko de paĉaj movadoj, kiel Esperanto. Finfine, la sopirita paco ekbrilis kaj mi reko-mencis la laboron kun novaj lernantoj, tre bonŝance, ĉar aliĝis al la movado novaj pioniroj. Ni ĉiuj kune sukcesis instrui pri Esperanto, pli aŭ malpli bone, preskaŭ la tutan loĝantaron de Cheste. Samtempe ni organizis ekskursojn, festojn kaj prelegojn; ni vizitis aliajn urbetojn, por propagandi, kaj en diversaj lokoj fondis novajn klubojn, ĉeestis la naciajn kongresojn k. t. p. Dum la 7-a nacia kongreso, en Sevilla, la jaron 1928^o, lia princa moŝto, la generalo Karolo Borbon, metis sur mian bruston la Ordenon de la laboro, kiun mi ricevis kun granda emocio.

En 1918^a, post la militfino, kelkaj landoj suferis teruran malsaton. En 1920^a mi kaj, supozeble, ĉiuj delegitoj de U. E. A. ricevis de la esperantistoj de Graz (Aŭstrujo) korŝiran cirkuleron, en kiu ili petis urĝan helpon por la aŭstraj infanoj, senku'paj viktimoj de la milito. La samideanoj de tiu urbo petis, ke ni gastigu en Hispanujo tiujn etajn malfeli-ĉulojn. Kelkaj el ni tuj respondis, promesante helpon laŭ nia eblo. La aŭstroj kun vera klarvido elektis sinjoron Emilio Gastón Ugarte, direktoro de la nova bonfara entrepreno, kaj la urbon Zaragozo centro de la organizo.

Ĉi tiun aferon mi ne intencas detale priskribi, ĉar tio estus tro longa. Mi nur iomete diru pri mia partopreno, eble la plej malgrava. La vilaĝo Cheste petis 50 aŭstrajn geinfanojn, sed nur 14 venis, ĉar la ŝipa firmo Tayá, transportanta senpage la infanojn, fiaskis kaj de tiam ni devis ĉesigi la alporton de geinfanoj. Ĉar mi estis delegito por la infanoj en Cheste kaj en la valencia regiono, mi devis vojaĝi por solvi ĉiujn koncernajn aferojn. Por akompani la lastan ekspedicion de infanoj, revene al ilia patrujo, estis elektataj: Pastro Casanovas, Jacinto Comella, Karolo Barthel kaj mi.

Kiel en ĉiuj gravaj aferoj, ni tiam devas multe labori kaj suferi, ĝis feliĉe ni plenumis nian taskon. Tamen, tre granda estis nia rekompenco, ĉar per tiu entrepreno mi konis multajn tre bonajn geamikojn, kaj ankaŭ ĉar ni la hispanoj akompanintaj, dum nia reveno hejmen, estis akceptataj en privata aŭdienco de lia Papa Moŝto, Pio XI.

Firme mi kredas, ke ĉiuj miaj kamaradoj, dum la helpado al la aŭstraj geinfanoj, agis en siaj lokoj minimume tiel bone kiel mi, kaj kelkaj eĉ pli bone, sed tiu, kiu laboris eksterordinare bone, treege bone kaj senkompare bone, estis nia karega estro aŭ direktoro, sinjoro Emilio Gastón, kiu, krom la zorgado de la infanoj en la aragona regiono, aranĝis genie ĉiujn aferojn, ĉu naciajn, ĉu internaciajn, kaj admirinde solvis ĉiujn konfliktojn. Li agis ĉiam senlace, tute lojale, noble, inteligente kaj bonkore.

Sinjoro Gastón, kun sinjoroj Montagud kaj Benítez, estis la gloraj fondintoj de la societo «Frateco» en la jaro 1908^a.

KELKAJ VORTOJ SINCERAJ

Kvankam mi estas certa, ke ĉiuj kunlaborantoj en nia jubilea Bulteno, estas pli kapablaj ol mi por tion fari, mi tamen deziras ankaŭ ion skribi por tiu revuo, kiu elmontras nian grandan amon al Esperanto kaj al nia klubo, ĝin reprezentanta en Zaragozo. Ĝoje kaj emocie mi portopenis la belan feston, okaze de la 50^a datreveno de la fondo de «Frateco». Tie mi vidis kune kelkajn el la gesamideanoj, kiuj jam ĉeestis la klubon, kiam mi - ankoraŭ infano - ĝin vizitis kun miaj gepatroj. Ankaŭ tie mi renkontis aliajn, kiuj poste kune kun ni lernis Esperanton, kaj fine la gejunulojn, kun kiuj ĉiutage ni kunvenas en la klubo.

La unuaj sentigis al mi la naturan emocion rememori tiujn jarojn, kiam mia hejmo estis kvazaŭ daŭrigado de «Frateco» kaj kie miaj gepatroj lernigis al ni en Esperanto infanajn babilajojn. Poste, mia hejmo farigis Sekretariejo de la Aŭstria infanhelpejo, bonfara entrepreno, kiu kunigis ne nur la hispanajn esperantistojn, sed ankaŭ alilandajn samideanojn, unuigitajn kun ni, en la nobla idealo de tuthomara frateco, kiun nia Majstro sopiradis.

Sed tiun mian emocion superas la ĝojo, ĉar mi vidas, ke nun en «Frateco» svarmas

Sinjorojn Montagud kaj Benítez mi ne konis funde, sed poste mi sciis, ke ili estis same indaj kaj ankaŭ estis indaj multaj, kiuj poste aliĝis al la nova societo, por ĝin kreskigi kaj progresigi. La sekvoj estas vere naturaj: bonaj agantoj kun bona volo naskas bonan agon, nome Fratecon. Pro tio ni nun povas festi la 50-jaran datrevenon de la fondo de nia societo, kiu dum tiel longa tempo tre sukcese faris multe da kursoj, eldonaĵoj, kongresoj, paroladoj kaj aliaj aferoj.

«Frateco» verŝajne estas la plej malnova Esperantista societo en Hispanujo, kaj unu el la plej malnovaj kaj gravaj en Eŭropo. Tial, ni ĉiuj, kiel Fratecanoj, rajtas fieri pri nia kara societo, laborante plej multe kaj plej fervore, por ke ĝi daŭru vivi, almenaŭ ĝis oni atingos la ĉiaman revon de nia genia Majstro Zamenhof, kiu deziris, ke la tuta homaro estu granda rondo familia, kies ĉiuj membroj reciproke sin komprenu kaj amu sincere.

Francisko Máñez

tiom da entuziasmaj gejunuloj, ke ili certe atingos, ke nia klubo estu tiel grava kaj prospera, kiel ĝiaj fondintoj deziris.

La justeco ja postulas, ke mi ĉi tie elstarigu la personon de nia Prezidanto, S-ro Pedro Marqueta, kiu kun spirito esence simboliganta ĉion, kion la Majstro volis signifi, formas la ĉeneron, kiu kunigas la pasintajn kun nia tempo, kaj etendiĝas al la estonteco, precipe rilate al la propra familio, al la propraj gefiloj, novaj burĝonoj de ĉiam floranta arbo.

Kun granda iluzio, ni deziris festi en vere frata medio la Oran Jubileon de nia Societo. Nun, kiam tiu dato koincidas kun la komenco de la centa jaro de 1^a naskiĝo de D-ro Zamenhof, nia plej granda deziro estas, ke ni ĉiuj, membroj de «Frateco» dum la tuta daŭro de ĉi-jaro, klopodu diskonigi la internacian lingvon, ne nur en nia urbo, sed ankaŭ en nia regiono.

Kaj nun mi finas ĉi tiun artikoleon, kun dankoplena rememoro al ĉiuj, kiuj en la ĵus pasinta festo dediĉis laŭdajn kaj simpatiajn vortojn al mia patro, kiu grandan parton de sia tempo, krom sian tutan entuziasmon, malavare fordonis al nia kara Esperanto kaj al ĝiaj noblaj idealoj.

Emilia GASTON



ZAMENHOF

*Ĉe la sojlo de la Zamenhof-jaro, la ĝentila iniciativo de
Vieno devas esti ekzemplo por la tutmonda esperantistaro*

ZAMENHOF

Li ne estis granda homo.
Nek laŭ fam', nek pozicie,
Kaj figuras lia nomo
Ne altrange historie.

Konservados do ĝisnune
Inter la popoloj baron,
Malhelpante kvazaŭ pune
La tutmondan solidaron.

Jen - ne sidas sur ĉevalo
Ŝtatgravulo, li ŝvelbruste-
sur modesta piedestalo,
Li alfrontas nin nur buste.

Lia lingva instrumento
Fontis el la nobla amo,
Kvazaŭ la medikamento
Kontraŭ la homara dramo.

Lia monument' ne pompas,
Kiel por glorinda viro-
Tamen ĉiu ajn sin trompas,
Ne pensante: Kavaliro!

La homaro iam dankos
Plenagnoske, kun konscio,
Lin pro l'alta don', se mankos
Miopec' de l' tradicio.

Kavaliro de la koro
Li ja estis, plej pasia,
Brava viro de laboro
Por verkego tre genia.

Dankos ĝi l' inteligenton
Lian kaj pri viv-ofero
Kaj starigos monumenton
ĉiulande sur la tero.

Al homaro, instrumenton
Li elpensis por kompreno;
Por ke gent' alian genton
Lingve konu do sen peno.

Li jes estis granda homo-
Kaj ideo, kaj genie-
Kaj figuros lia nomo
Tre altrange historie!

Por ke, ĉar ne fremda lando
Nebuligas sentimenton,
Homo sciu, ke samsange
Vibri igas saman senton.

Firme staru, monumento
Zamenhofa! Lia verko
Esperanto kaj ni men do
Fortikiĝu, kiel kverko.

Saman senton de la koro
En la hom' alinacia,
Kaj ke nur damninda moro
Pro inerto tradicia.

Por plenum' de l' tasko lia
Por fratiĝo, por kompreno;
Kaj kun graco la Mesia
Je l'homar' por pac' kaj beno!

*Verkita de HUGO KRAUS por la inaŭguro de la Zamenhof-Monumento,
27 Julio 1958, en Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio*



S-ro Emilio Gastón Ugarte

Dum la heroa epoko de Esperanto en Zaragozo, S-ro Emilio Gastón bone konsciis pri la tasko farenda; feliĉe, li posedis la plej necesajn kvalitojn por la gvida rolo, kiun trafe kaj senafekte li ludis: delikata spirito, inteligenta homo, fervora samideano kaj lerta organizanto. Lia granda kaj rimarkinda elstaro havas do klarajn trajtojn de alta simbolo, per kiu la junaj promocioj de pacaj batalantoj devas honorigi ĉiujn aliajn fervorulojn, kiuj lin akompanis kaj helpis, en oferoj kaj klopodoj, tra dorna tereno, pionire tratatante kun gaja eltenemo la vojon, sur kiu jam pli sekure kaj firme hodiaŭ ni marŝas.

Luis Hernandez

SONORILOJ DE VESPERO

(EL T. MOORE)

Sonoriloj de vespero, sonoriloj de vespero !
Kiom ili rakontadas pri juneco kaj espero,
Pri la domo de gepatroj, pri la dolĉa kora ĝojo,
Kiam mi ilian sonon aŭdis je la lasta fojo !
Longe, longe jam forpasis tiuj de l'ĝojeco horoj !
Ekdorminte por eterne jam ne batas multaj koroj !
En la tomboj ili loĝas post la ĝojo kaj sufero :
Ne por ili la muziko, sonoriloj de vespero !
Ankaŭ kiam mi ripozos por eterne en trankvilo,
Ne ekhaltos la batado de vespera sonorilo,
Dum kun kanto novaj bardoj paŝos jam sur nia tero
Kaj vin aŭdos kaj vin laŭdos, sonoriloj de vespero !

A. GRABOWSKI

Aranĝo, kovrilo kaj redaktado:


**** LUIS HERNANDEZ ****

La Espero

HIMNO ESPERANTISTA

Movo de milita marŝo.

F. DE MENIL



1. En la mond-on ven - is nov-a
2. Sub la sankt-a sign-o de l'Es-
3. Sur neu-tral-a lingv-a fun-da-




sent - o, tra la mond-o ir - as fort-a vok - o; per flug-
per - o, ko-лект - ig - as pac-aj ba-tal - ant-oj, kaj ra-
ment - o, kom-pre-nant-e u - nu la a - li - an la po-



ul - oj de fa-cil-a vent-o nun de lok - o flug-u ĝi al
pid-e kresk-as la a-fer-o per la-bor - o de la Es-per
pol-oj far - os en kon-sent-o u - nu grand-an rond-on fa-mi



lok - o. Ne al glav-o sang-on so-i fant-a ĝi la
ant - oj. Fort-e star-as mur-oj de mil - jar - oj in - ter
li - an. Ni - a di - li - gent - a ko-leg-ar - o en la



hom-an tir-as fa-mi-li - on: Al la mond'e-tern-e mi-lit -
la po-pol-oj di-vid-it - aj, Seddis-salt-os la obs-tin-aj
bor - o pac-a ne lac-ig - os, Ĝis la bel - a song-o de l'Hom.



ant - a Ĝi pro - mes - as Sankt-an har - mo - ni - on
bar - oj per la Sankt-a Am - o dis - bat - it - aj
ar - o por e -



ter - na ben' e - fek - tiv - ig - os.